# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 302 (69) - KVINA EPOKO MARTO 1998



ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO — KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo

Peranto de UEA, FEL, Literatura Foiro, IKEL, La Kancerkliniko, La Dua Jarcento (IEM), Litova Stelo.

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental) Catalunya/Katalunio
Tel + Fakso (93) 716.36.33, (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20h.).

Ret - adreso: kea@stel.net
Ret - paĝo: http://www.stel.net/esperanto/kea

Kotizoj por la jaro 1998: Individua Abonanta Membro 3.500 p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

Banko: Caixa d´Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència 461 Sabadell. Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Llibert Puig; Vicprezidanto: Josep Franquesa; Ĝenerala Sekretario: Xavier Rodon; Kasisto: Òscar Puig; Komitatanoj: Lluís Armadans, Arnald Massanas, Paco Belmonte, Felip Artero, Lluís Aragay, Mercè Porta, Luz Vàzquez, Sun Farràs.

Kontrola Komisiono: Èric Collignon, Bartomeu Costa, Ramon Perera

Kataluna Esperantisto: Pere Bernús, Llibert Puig, Carles Berga, Xavier Rodon, Luz Vàzquez.

La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080 BARCELONA

Imprès a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. (93) 725.50.91


Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

la 54a internacia junulara kongreso

de la 25a de julio ĝis
la 1a de aŭgusto, 1998
Rijeka, Kroatio
temo: amaskomunikiloj
kreantoj de amaskulturo




kaj la 5a mara internacia renkontiĝo




de la 21a ĝis
la 25a de julio, 1998
Savudrija, Kroatio
temo: maro


organizas
Kroatia Esperanto-Junulara Asocio

## ATENTIGO

Dum la lastaj jaroj nia asocio abonis kolektive internacian revuon por siaj membroj, sed ĉi-jare la plenumkomitato decidis anstataŭe donaci kelkajn librojn kaj broŝurojn,laŭeble proprajn eldonaĵojn.

Anticipe la membroj ricevis jam la revuon "Bosnia Lilio" ene de nia solidara projekto kun Bosnio kaj nun tra via grupo aŭ delegito vi ricevos la libron "Spite al ĉio Bosnio", ankaŭ rilate la saman projekton.

Troviĝas en preparo monografio de nia kataluna pioniro Delfí Dalmau, kiun ni omaĝis dum nia pasintjara kongreso en Figueres.



## CSEH ĈE NI

Ni esperantistoj kutimas troigi pri niaj faroj kaj atingoj, sed kredu min, mi tute ne troigas kiam mi diras, ke la lasta seminario organizita de KEA estis granda sukceso.

Temis pri pedagogia trejn-seminario de la renoma metodo Cseh en kiu partoprenis 13-14 homoj dum du sinsekvaj semajnfinoj (16-17 kaj 23-24 de januaro),entute 20 horoj. La celo de la seminario estis konatiĝi kun la teknikaj eroj Cseh-metodaj (gesto, pantomimo, kontrastigo, montro de objektoj aŭ bildoj,ktp). Konatiĝo kiun la lernanto devis pruvi en la lasta tago de la seminario per praktika instruado al la klaso (ne ĉiam bonorda kaj disciplina) de gramatika punkto preparita dum la antaŭaj tagoj. Tiu estis sendube la plej interesa kaj laboriga parto, sed ankaŭ amuza malgraŭ la nerva streĉiĝo kiun ĝi kaŭzis ĉe multaj el ni.

Parton de la sukceso ni ŝuldas al la organizantoj, kompreneble; alian parton al la aliĝintoj mem (ni ne ĉiam konscias, kiun gravan rolon ni havas en la movado simple kiel aktivaj partoprenantoj en ĝiaj aranĝoj) sed neniu kontraŭstaros la aserton, ke se la seminario brile sukcesis estis danke al la bonega laboro de sia gvidantino, d-rino Katalin Smidéliusz, kiu afable sed firme laborigis nin senpaŭze per gramatika antaŭtesto por kontroli lingvan nivelon, pantomimaj ekzercoj, spektado de Cseh-metodaj klasoj sur videobendo, montro de utila materialo kiu amase eliĝis el ŝia kvazaŭmagia sako, ktp. Tre pensiga ekzerco estis la spektado de klaso pri (tute neekzistanta) fremda lingvo fare de Audrey Childs-Mee; ni povis proprahaŭte sperti kion malfacila estas la lernado de lingvo kaj kiom multe ni devas malrapide, klare kaj pograde instrui.

Eble la instruistino estis iomete tro indulga: ja fine de la seminario nur unu partoprenanto (provizore) ne sukcesis, ĉiu alia ricevis atestilon A-gradan. Sed ŝi ja certe atingis sian celon, kaj tre bone instruis nin ne nur pri la Cseh-metodo, sed pri la graveco de kvalita instruado de Esperanto ĝenerale.

Al tio ni strebu.

Pedro M.Martin

( La partoprenantojn vi vidas sur la frontpaĝa foto)

## NIA BIBLIOTEKO-ARKIVO

Post la inaŭguro de nia Biblioteko-Arkivo "Petro Nuez" okazis la Asembleo de nia Asocio fine de februaro kaj estrarkunveno fine de marto kaj en ambaŭ manifestiĝis la deziro ke nia Biblioteko-Arkivo fariĝu aktiva helpo por niaj studemuloj kaj agemuloj. Tiucele la plenumkomitato de KEA prilaboras funkciigan regularon kiu faciligu al niaj membroj kaj eventuale al ĉiuj esperantistoj bonan utiligon de ĝia materialo.

Ni daŭrigas la enkomputiligon de la datumoj de libroj, revuoj kaj alispecaj dokumentoj kio postulos plurmonatan laboron. Eta ampleksigo de nia bretaro jam fariĝis necesa.

Ĉar amasiĝis multaj duoblaĵoj ni jam komencis interŝanĝon kun jenaj bibliotekoj: E-Biblioteko "Fondaĵo Van Biervliet" en Kortrijk (Belgio), Biblioteko de Litova E-Centro, Internacia E-Muzeo en Vieno kaj E-Muzeo en St. Pau d'Ordal.

Ene de la Kampanjo-2000 ni kunlaboras en la agado "Savi Kulturan Heredaĵon" kaj tiucele nia biblioteko estis registrita de la respondeculoj Sabine + Christian Darbellay.

Nia biblioteko daŭre riĉiĝas per diversaj donacoj. Ni dankas ĝisnunajn donacintojn: Delfí Dalmau i Argemí, Hèctor Alòs, Ricard S.Güell, Pere Soler, Àngels del Pozo, Juvenal Puig, Llibert Puig (enlandajn) kaj Katalin Smidéliusz (Hungario), J.Bishop (Aŭstralio), Krizantemo (Japanio) kaj Litova E-Asocio.



Parto de nia Biblioteko. (Foto Ll. Puig).

## MAJORKA ESPERANTISTARO

Ni bonvenigas la ĵus aperintan unuan bultenon de la Majorka Esperantistaro. Temas pri kvarpaĝa DIN.A-4 presaĵo trilingva: Esperanto, kataluna kaj hispana.

Mirigas nin sur la frontpaĝo la bildo de ĝia, ni diru, simbolo: la verda diableto, laŭŝajne tiea populara tradicio (vidu reprodukton).

Ni deziras al niaj insulaj kolegoj la plej belan sukceson en ilia strebo kunordigi la tiean movadon kaj ni invitas niajn membrojn gratuli ilin je la adreso: Majorka Esperantistaro, Apartat 2, 07110 BUNYOLA (Mallorca).

(Xavier Margais)





## PRI KOSOVO

Ni evitu novan genocidon en Eŭropo. Jen la enkonduka alvoko kiun nia asocio diskonigis per interreto en Esperanto kaj en la kataluna ĉe la TTT-adreso: stel.net/Esperanto/kosovo. La informo aperis en la tiutema paĝo ĉe la sabata eldono de "Diari Sabadell" (vidu reprodukton).

Ĉiuj retpoŝtuloj estas invitataj diskonigi la mesaĝon per kiu ajn lingvo, kun mencio ke temas pri iniciato de KEA.

Unuan gratulan reagon ni ricevis de Renato Corsetti, la konata itala aktivulo.




## REUS/TARRAGONA

En sia numero 65 (marto-aprilo 98) la revuo "La Lletra A" el Reus, daŭre aperigas tutpaĝan lecionon de Esperanto kaj aparte mencias la ricevon de nia revuo K.E. kun klarigo pri la adresoj de nia Asocio kaj poŝta kaj reta.

Diari de Tarragona la 3an de decembro aperigas leteron de neesperantista leganto el Salou kiu pledas por Esperanto kiel deviga studobjekto en la lernejo.

(Joan Marimon)

## EKSTERLANDAJ VIZITOJ

Dum januaro krom Katalin Smidéliusz kiu invitita de nia Asocio gvidis la Cseh-seminarion, vizitis nin geedzoj Bishop el Aŭstralio kaj japana ĵurnalistino Krizantemo.



Akcepto de krizantemo kaj Katalin Smidéliusz ĉe Unesko-Klubo. (Foto Lluís Aragay).

## ESPERANTO EN LA REVUO "AJOBLANCO"

Inter majo/junio aperos la "Guia Ajoblanco", kiu celas informi pri ĉiuj kulturaj asocioj. Nia Asocio estis invitita sendi la taŭgan informadon pri Esperanto. Ĉar la revuo celas la tutan ŝtaton, aperos kiel kontaktadresoj ne nur KEA sed ankaŭ HEF.

La ĉi-jara Asembleo okazinta ĉe Unesko-Klubo, sabaton la 28an de februaro je la 19-a h.kaj je dua kunvoko, allogis ne multajn membrojn, sed tamen la etoso estis sufiĉe interesa.

Per ĉi-sekvaj aldonaj tekstoj vi informiĝos pri la pasintjaraj agadraporto kaj pri la spezokonto kaj bilanco, ambaŭ dokumentoj aprobitaj de la Asembleo.Per ili la membroj povas bone kompreni kiel agis nia Asocio dum 1997. Tiucele bone helpas ankaŭ la raportoj pri ĉiu unuopa aranĝo, aperintaj en nia revuo.

La Asembleo speciale dankis la transdonon al nia Asocio de la "Patronaro Petro Nuez", kiun ĝi de nun administras.

Elstaraj asambleaj decidoj estis: la firma antaŭpuŝo de nia eldonagado al kiu estis buĝetita 200.000 p-toj (parte el Patronaro P.Nuez); la daŭra subteno de la junulara agado per speciala buĝeto de 90.000 p-toj, kio devigas tamen subvencii la aliĝon al IJK de almenaŭ unu reprezentanto kataluna; la eta plialtigo de la kotizo je 3.500 p-toj (anstataŭ la ĝisnuna de 3.350 p-toj); la plialtigo de la koresponda kurso je 9.900 p-toj (anstataŭ la ĝisnuna de 7.000 p-toj) ĉar de nun la kursanoj ricevos la novan vortaron E-kataluna.

Ankaŭ kritikon ni menciu. Oni plendis ke nia revuo malfrue aperas kaj ke ĝia enhavo ne estas sufiĉe kvalita. La ĝisnuna redaktora kutimo estis pretigi kaj sendi la revuon dum la posta monato al la forpasinta trimestro, laŭcele raportipri ĉio okazinta dum tiu trimestro, sed tiu kutimo estas modifebla en la senco ke la membroj ricevu la revuon dum la lasta monato de la trimestro mem.Pri la enhavo la opinioj ĉiam estas subjektivaj kaj ĉar ni devas pli-malpli kontentigi ĉiujn ŝatojn, ni klopodas ke ĝi estu maksimume varia. La redakcio tamen volonte aperigos kunlaboraĵojn, kiuj ĝis nun bedaŭrinde ne oftis.

Okazis laŭstatuta estrarŝanĝo kaj la novan Plenumkomitaton vi povas legi en la kolofono sur paĝo 2-a.

Fine ni konfesu ke laŭ onidiroj la Asembleo estis iom tro longa kaj cetere plendetoj manifestiĝis pro la malfrua komenchoro. Venontjare ni klopodos plibonigi tion.

## AGADRAPORTO DE KEA DUM 1997

Enkadre de nia solidara projekto kun Bosnio ni eldonis la libron "Spite al ĉio Bosnio" kaj la revuon "Bosnia Lilio". La revuon ni sendis al ĉiuj membroj de nia asocio kaj ankaŭ al 100 diversaj eksterlandaj adresoj laŭ peto de E-Ligo de Bosnio-Hercegovino.

Nia ĉefa aranĝo dum la jaro estis la okazigo de nia 28-a Kataluna kaj 1-a Transpirinea E-Kongreso en Figueres inter la 1-a kaj 4-a de majo. Sendube ĝi fariĝis unu el la plej sukcesaj kongresoj lastjaraj, verŝajne pro nia iniciato kunkongresi kun la E-organizaĵoj en nia Eŭroregiono. Aliĝis 131 gekongresanoj, sed pluraj aliaj parte vizitis la Kongreson. Pri ĝi vaste kaj detale informis nia revuo.

Aliaj aranĝoj de nia Asocio estis:

• Partopreno kun CES (Centro de E-Sabadell) en la Unua Foiro pri Asocioj neprofitcelaj en Sabadell, laŭ organizo de la loka Junula Komercĉambro la 31-a de oktobro, 1-a kaj 2-a de novembro.

• Prelego de prof.Ludoviko de Yzaguirre pri E.en Sabadell la 29-an de oktobro, kiel komplementa aranĝo de la Foiro.

• Prelego de Herbert Mayer, direktoro de E-Muzeo en Vieno, la 22-an de novembro en Unesko-Klubo.

• Inaŭguro de Biblioteko-Arkivo "Petro Nuez" kun partopreno de lia vidvino Maria Garcés en Sabadell la 14-an de decembro, okaze de la tiea Zamenhof-Festo.

• Publika prezento de la eldonaĵoj de KEA pri Bosnio la 13-an de decembro ĉe Unesko-Klubo kun partopreno de reprezentanto de la Domo de Bosnio en Barcelono.

• Prelego ĉe Unesko-Klubo de la hungara profesoro Péter Broczkó.

Menciindas ankaŭ jenaj plenumitaj agoj:

• Eldono de 4 numeroj de nia revuo kun entute 48 paĝoj.

• Eldono de informilo pri nia asocio, je dispono de ĉiuj niaj membroj.

• Aperigo de anonco en la Jarlibro de UEA.

• Kolektiva abono de Heroldo dum la unua semestro.

• Pretigo de esperantlingva Web-paĝo turisma por Arenys de Mar.

• Sukcese interesigi 4 katalunajn eŭroparlamentanojn eniri en la liston de G.Pirlot.

• Pretigo de propraj Web-paĝo kaj retadreso.

• Partopreno de kelkaj estraranoj la 14-an kaj 15-an de novembro en la Triaj Diskuttagoj de FOCIR.

• Partopreno la 18-an de novembro en la omaĝo al nia membro Manuel de Seabra.

Ni nepre devas gratuli la agadon de nia aliĝintaj Grupoj en Sabadell kaj Barcelono kaj aktivuloj en Reus/Tarragona, kiuj dum 1997 plej bone agadis.

Ankaŭ la bona agado de KEJ kun 3 renkontiĝoj dum la jaro estas gratulinda.Kaj laste sed ne malpli gravaj, ni menciu la pretigon de la vortaro E-kataluna fare de H.Alòs kaj J.Carbonell, kiu publike prezentiĝis dum nia Kongreso kaj la kurson kiun gvidis Neus Moly kaj Ramon Perera en la Somera Kataluna Universitato en Prada duan sinsekvan jaron.

Ni finas nian raporton dankante ĉiujn niajn membrojn, kiuj per sia ĉeesto kaj kunlaboro sukcesigis nian agadon.

SPEZOKONTO DE KEA DUM 1997

| | |
|---|---|
| ENSPEZOJ | |
| Membrokotizoj | 705.471'— |
| Kotizoj 97 Dumvivaj Membroj | 20.450'— |
| Projekto Bosnio | 311.968'— |
| Libroservo | 142.053'— |
| Perado internaciaj revuoj | 401.445'— |
| Perado UK.Montpeller | 79.780'— |
| Kongreso Figueres | 908.635'— |
| Koresponda kurso | 17.874'— |
| Aranĝoj | 18.160'— |
| Abonoj KE | 34.400'— |
| Patronaro Petro Nuez | 352.251'— |
| Kongresa subvencio | 300.000'— |
| Fondaĵo komputilo | 9.300'— |
| Bankaj interezoj | 340'— |
| | 3.302.127'— |
| ELSPEZOJ | |
| Projekto Bosnio | 245.264'— |
| Kongreso Figueres | 922.790'— |
| Administrado | 159.939'— |
| Oficeja ilaro | 267.280'— |
| Kolektiva abono Heroldo | 136.896'— |
| Sidejo | 50.000'— |
| Aranĝoj | 57.894'— |
| Libroservo | 143.137'— |
| Perado internaciaj revuoj | 327.530'— |
| Kataluna Esperantisto | 135.355'— |
| Koresponda kurso | 3.138'— |
| Pagitaj KEJ-kotizoj 95-96 | 76.023'— |
| Bankaj kostoj | 40.522'— |
| Stipendioj Kataluna Kongreso (7 x 6.000) | 42.000'— |
| Nepagitaj kotizoj | 41.000'— |
| Profito dum la jaro | 653.359'— |
| | 3.302.127'— |

BILANCO DE KEA JE 31.12.97

| | |
|---|---|
| AKTIVO | |
| Kuranta kaso | 29.196'— |
| Konto Ŝparkaso | 438.542'— |
| Subvencio Kongreso (enspezota) | 300.000'— |
| Libroserva stoko | 64.829'— |
| Enspezotaj kotizoj | 41.000'— |
| UEA-konto(enspezota fakturo) | 8.400'— |
| FEL-konto | 65.500'— |
| Faksilo (57.713-6412 amortizo) | 51.301'— |
| Komputilo | 137.280'— |
| Fotokopiilo | 130.000'— |
| | 1.266.047'— |
| PASIVO | |
| Dumvivaj Membroj (181.500-20.450) | 161.050'— |
| Pagotaj fakturoj UEA | 10.640'— |
| " aliĝiloj UK | 79.780'— |
| " KEJ-kotizoj 97 | 34.167'— |
| Patronaro P.Nuez (352251-42000) | 310.251'— |
| Fondaĵo Komputilo | 16.800'— |
| Profito dum 1997 | 653.359'— |
| | 1.266.047'— |

## REKOMENDINDAJ ARANĜOJ 1998


Bonvenon
**en Svidniko/Lublino**
(Pollando)
**23-28 aŭgusto 1998**

por la
**17a Internacia Literatura Forumo**
pri la juda kulturo
kaj ĝia kontribuo al la esperanta

"en ĉiu areto da cindro
mi serĉas proksimulojn"
(el "La kanto pri la murdita juda popolo"
de Iĥok Kacenelson)

Ne forgesu ke la unua aliĝperiodo
finiĝas 31 marto 1998

La aliĝilo kaj la tarifoj aperis en LF 170





**ĉe la domparo**

20an - 23an de majo
*Naturamika monatfino*
27an - 28an de junio
*Monatfino por infanoj kaj familioj*
14an - 19an de julio
Fernando Vurpillot: *Enkonduko al jogo*
21an - 26an de julio
Sabira Ståhlberg: *Interkultura komunikado*
28an - 30an de julio
*Survoje al UK: turisma kaj lingvo(re)lerna programo*
9an - 10an de aŭgusto
*1a Forumo por la Esperanta Civito*
12an - 18an de aŭgusto
*1a PIK - Plurnivela Internacia Kursaro.*
Instruas Claude Gacond, Gioegio Silfer, Sabira Ståhlberg, Agnes Verrasztó

Se vi deziras posedi la plej kompletan liston de aranĝoj dum 1998, nepre petu la senpagan numeron de *Heroldo*; ( vidu apartan informon sur paĝo 11a ).

## KATA-LUNO 34/35

Jarfine de 1997 aperis la lasta revuo de nia Junulara Asocio. Temas pri duobla numero 40-paĝa en formato DIN-A-5 kun tre varia kaj interesa enhavo kaj dulingva E-kataluna, ĉar ĝi celas esperantistojn kaj neesperantistojn.Elstaras la intervjuo al Xavier Rodon, ĝen.sekretario de KEA, la kutimaj instigaj komiksoj de Arnau, la interesa primovada sperto de nova esperantistino "Survoje al Esperanto", artikolo pri la eblecoj de Esperanto en interreto kaj la enlistigo de la KEJ-servoj.

Por ne KEJ-membroj la revuo estas aĉetebla ĉe la adreso: KEJ-Padilla,196-Barcelono tel.246.3736.

## AMNESTIO INTERNACIA


Dum la semajnfino 21-22-a de marto okazis en Barcelono la 24-a Asembleo de ĝia hispana sekcio kaj 20-a datreveno de ĝia oficialigo. Ĝin partoprenis la ĝen.sekretario tutmonda de AI s-ro Pierre Sané kiu informis ke okaze de la ĉi-jara 50-a datreveno de la Deklaracio de la Homaj Rajtoj, AI iniciatis kampanjon por la kreo de Konstanta Internacia Kortumo.

La unua prezidanto de KEA Manuel Casanoves ankaŭ estis la unua membro kaj unua prezidanto de AI en la hispana sekcio (vidu KE.n-ro 299-junio 1997).

## ELS CAMINS DE LA NIT

Jen poezia verko en la kataluna de nia membro Ramon Minoves, eldonita de "Columna". Ni gratulas nian samideanon kaj deziras al li grandan sukceson. La prezento de la verko okazis la 19an de decembro 1997 en la Civitana Centro "les Cotxeres de Sants" en Barcelono.

## KORESPONDADO



Jacques kaj Marie-Françoise Bodin deziras korespondi kun kataluna samidean(in)o. Ili estas 43 kaj 42-jaraj kaj ŝatas legadon, promenadon kaj turismon kaj deziras interŝanĝi bildkartojn. Ilia adreso estas: 35 rue Sgt Bonnelie - FR-24000 PERIGUEUX (Francio).

## KEJ-AGADO

### FOIRO "PER LA TERRA"

Niaj gejunuloj denove partoprenos ĝin dum la 17-a, 18-a kaj 19-a de aprilo en "Parc de la Ciutadella". Espereble la vetero estos indulga kaj tio permesos ke granda homamaso vizitu la E-budon.

## ALIAĴOJ

### UNIVERSALA FORUMO DE UNESKO

La Ĝenerala Asembleo de UNESKO (12.11.97) decidis patroni la Universalan Forumon de la Kulturoj, okazonta en Barcelono en la jaro 2004.

La eventon plene apogas kaj la ŝtata kaj la kataluna registaroj. La celo estas konstrui "kulturon de paco". La forumo daŭros 150 tagojn kaj fakte funkcios ekde la jaro 2001, kvankam jam en 1998 oni laboros super la projekto pere de "virtuala forumo".

Okazos internaciaj kunvenoj, debatoj, ekspozicioj, spektakloj, premioj, TV-programoj, ĉio en la kadro de tutmonda interagado.

Unu el la ĉeftemoj estos la lingvoj de la mondo. Oni defendos la rajton de ĉiuj lingvoj esti en Interreto kaj oni antaŭvidas la ĉeeston en Barcelono de po unu hom-paro de ĉiu lingvo de nia planedo. Jen akvo al la muelilo de la esperanta komunumo. Jen plej taŭga areno por Esperanto.

(Miguel Gutiérrez-redaktoro de HEF-bulteno)

## VALENCIO

Du ĝojigaj novaĵoj venas el Valencio. Unue la sukcesa E-kurso okazinta en la Filologia Fakultato de la Valencia Universitato, gvide de la profesoro Augusto Casquero, inter la 2-a kaj 7-a de marto 1998, laŭŝajne la unua en la tuta hispana ŝtato kun vera oficiala akademia valoro, ĉar la lernantoj ricevis atestilon kiu valoras du akademiajn kreditojn. La partopreno de 60 gelernantoj superis ĉiujn antaŭvidojn kaj por la venonta kurso oni atendas samkvantan lernantaron.

La dekanino de la Fakultato kiu disdonis la diplomojn informis ke laŭ ĝiaj planoj, la studado de E. ne nur estos libere elektebla sed normala studobjekto de la kariero.

Due la inaŭguro de la nova kaj propra sidejo de Valencia E-Grupo ĉe Avenuo Peris i Valero, 96-35, okazinta la 1an de marto.

Tre sincere ni gratulas niajn valenciajn gesamideanojn pro ambaŭ atingoj

## CENTJARA NASKIĜDATREVENO DE FEDERICO GARCIA LORCA

Laŭ ricevita informo de Miguel Gutiérrez Adúriz, la nova ĉefredaktoro de la bulteno de HEF, oni antaŭvidas vaste omaĝi la memoron de la andaluza poeto per prezento de la reeldono de la verko "Sanga Nupto" dum la 57-a Hispana Kongreso de Esperanto; aperigo de artikoloj en la esperantistaj priliteraturaj revuoj; prelego por neesperantista publiko laŭ organizo de Madrida E-Liceo kunlabore kun la Granada Domo en Madrido kaj aliaj aranĝoj ankaŭ en Francio enkadre de la blindula kongreso en Bordozo, de la ĉiujara liberecana renkontiĝo kaj dum Internacia Studsemajno en La Kvinpetalo.

## HEJMOJ
## (Bulteno pri esperantaj komunumoj)

Ricevinte n-ro 10 (aŭtuno/vintro 97) ni volonte informas ke temas pri la bulteno de asocio kiu celas disvolvi internacian kulturon per E. en komunuma energiviglado. Ĝi informadas pri la internaciaj esperantlingvaj komunumoj, jam ekzistantaj. iam ekzistintaj aŭ projektataj. Disvolvas esperantistan komunuman movadon koheran kaj solidaran, kaj starigas reton de interhelpado. Instigas komunumojn malfermiĝi al internacieco dank'al E. kaj helpas la fondon de novaj esperantistaj komunumoj.

Kontakadreso: Christian Lavarenne Presbytére-FR-09800 BALAGUÉ-tel/fak.-33-(0) 561047066.

## ESPERANTO PYRÉNÉES
## (revuo de Federacio "Migdia Pirineus")

Sur la paĝoj de la ĵus ricevita numero 78 (unua trimestro 98) ni informiĝas ke revigliĝis la tiea Federacio kaj Bernard Legeay fariĝis ĝia prezidanto. Ni gratulas la aktivulojn de tiu Federacio pro la faritaj klopodoj.

En la sama numero aperas tre interesa historia studo pri la tiuregiona movado, kiun ni klopodos reprodukti en nia revuo; ankaŭ aperas informo pri projekto de invito de bosnaj infanoj kaj aliaj tre interesaj novaĵoj.

Indas mencii la novan aspekton de la revuo, tre modernan kaj bele enpaĝigitan.

## SUDFRANCIA STELO
## (revuo de Federacio "Llenguadoc Rosselló")

Ni kvitancas la ricevon de la numero 143 (4-a kvaronjaro 97) kie anonciĝas, krom la UK. en Montpeliero, la 16-a Printempa E-Staĝo 1998 okazonta en Agde inter la 3-a kaj 10-a de junio, kun aldona aliĝilo. Ni legas interesan artikolon de Claude Piron pri Europanto, la ŝerclingvo elpensita de tradukisto ĉe la Eŭropa Ministra Konsilio. Tuta paĝo pri alvokoj kaj helpopetoj altiras la atenton: Temas pri venigo de infanoj el Sarajevo; pri la projekto de Vinilkosmo Kolekto-2000; pri la multkultura ejo Kotopo en Liono; pri adapto-laboroj en la Kastelo de Grésillon; pri partopreno de afrikanoj en la UK kaj pri somera loĝejinterŝanĝo kun Praga familio. Ankaŭ meritas atenton la fondiĝo de nova asocio laŭ la nomo "Readapto kaj Esperanto" kiu celas per la lernado de E. readapti homojn kun socialaj problemoj.

# ESPERANTO EN MIDI-PYRÉNÉS. IOMETE DA HISTORIO

Ĉar ĉi-jare la francaj esperantistoj festas la centjariĝon de sia organizita movado (la tiama Société pour la propagation de l´Espéranto), jen kelkaj eroj de la historio de Esperanto en nia ekrevigliĝanta Federacio. (Ĉiaj kompletigaj informoj bonvenegaj!)

La "unua propagandartikolo en franca gazeto" aperis en Le Messager de Toulouse, la 28an de februaro 1891: "Grande découverte: une langue internationale". Ĝi estis subskribita "L. de B.". Ĝin sekvis sentitola artikolo en Le Nouvelliste du Tarn, la 8an de aprilo de la sama jaro, sed kun plena subskribo, "L.de Beaufront" kaj adreso: " à Saint-Sulpice (Tarn) ". Ni nun scias ke fakte temas pri Louis Chevreŭ kiu, baldaŭ fama sub tiu kaŝnomo, estis "tre verŝajne aŭ eĉ tute certe" la unua franco kiu fariĝis esperantisto.

Post kelkaj monatoj aliĝis pluraj personoj el Tuluzo kaj apudaj vilaĝoj. Post de Beaufront, Auguste Demonge, Gaston Moch kaj Henri Delachaŭ, la dek unu Tuluzianoj kies nomoj troviĝas en La Esperantisto je februaro kaj je marto 1892 estis la unuaj solaj francaj samideanoj! (Kvar el ili donis kiel adreson tiun de la Tuluza Petit Séminaire (et-seminario, unua ŝtupo al pastriĝo): 13 rue Romiguières, Toulouse)

Antaŭ ĝuste 100 jaroj, kiam "okazis por la unua fojo gazetaj polemikoj pri Esperanto" (feb.1898), nia regiono estis la ĉefa batalejo, kun unuflanke "la fama ĵurnalisto Fr.Sarcey" en i.a.La Dépéche de Toulouse, kaj aliflanke Gabriel Chavet kaj de Beaufront en i.a. Le Petit Méridional.

La unua grupo en la regiono ?

En 1902 esperantistiĝis Léon Beaumel (naskiĝinta la 8an de septembro 1870 en Tuluzo) kaj en 1905 li fondis kun D-ro Chalot la "Groupe Espérantiste de Toulouse". Li verkis artikolojn kaj gvidis publikajn kursojn kaj eĉ fariĝos vicprezidanto de la "Société Française pour la Propagation de l´Esperanto".

Ankoraŭ troviĝas en Tutmonda Jarlibro 1906, du el la unuaj Tuluzanoj, kiuj intertempe pastriĝis, E.Sarrat kaj M. Daubriac (nomumota Episkopvikario kaj mortonta en 1958). Alia pastro Emil Peltier, fondinto de Espero Katolika, mortis en februaro 1909 en Lurdo, kie estas lia tombo.

Arieĝa famulo

Ni ne scias kiam (sed antaŭ 1906) eklernis Esperanton Gustave Roy (naskita en Carmaŭ en 1869), instruisto de la germana (kaj poste ankaŭ de la hispana) de 1896 ĝis 1907 en Saint-Girons, ĉe la "Collège communal et de plein exercice" kaj poste "docento ĉe la liceo de Cahors" almenaŭ en 1908. Sed li famiĝis fondante la efemeran "Esperanto-ŝtaton" Amikejo en Moresnet-Neutre, ĉe la landlimo inter Belgio, Germanio kaj Nederlando.Li ne mortis en 1911 kiel erare skribite,sed la 5an de novembro 1943 en Tuluzo.

Ĝuste tie, en Tuluzo, estis okazinta en decembro 1927 la unua Kongreso de la Franclanda Esperantista Universitata Federacio, fondita en Lyon la antaŭan jaron. Ĝi "estis brila sukceso; ĝi ricevis, kiel la sekvantaj, la patronadon de la Ministro por Publika Instruado".

Ĉe la Liberiĝo s-ro Lafon lanĉis bultenon,Tuluza Stelo, kiu rapide fariĝis unu el la unuaj ligiloj agantaj por la regrupigo de la francaj esperantistoj post la milito. Tio estis altvalora ŝtupo, antaŭ la apero de Comprendre en Lyon kaj ĉefe la reapero de Franca Esperantisto

Dua revigliĝo

Post mallonga interrompo la " Groupe Espérantiste de Toulouse " refondiĝis la 25an de junio 1956 kun nova nomo " Tuluza Esperanto-Societo " kaj kun D-ro Albault kiel prezidanto kaj fraŭlino Touzet kiel sekretario. La 7an de marto 1959 reaperis Tuluza Stelo kiel " Oficiala organo de Tuluza Esperanto-Societo " kaj " Organe officiel de la Fédération Toulouse Pyrénées ": la unua (?) nomo de nia Federacio.

Samjaran printempon, post favora respondo de s-ro Dottin,Rektoro de la Akademio, la oficiala sidejo translokiĝis ĉe la " Regiona Pedagogi-Dokumentada Centro " (CRDP), kiu pruntedonis ĉambron po du horojn semajne por la Esperanto-aktivecoj ekde oktobro 1959.

Ĉu la Federacio jam ekzistis antaŭ tiu por ni unua mencio en Tuluza Stelo kaj de kiam ?. Sed ĝi estis oficiale registrata ĉe la Tuluza Prefektejo... nur la 6an de februaro 1968, kun nova nomo: " Fédération Midi-Pyrénées pour l´Espéranto ". Ĝia lasta prezidanto estis s-ro Raymond Pons, kiu mortis en oktobro 1995. Lia edzino (prezidantino de la Cercle d´Etudes Espérantistes de l´Ariège) ĉeestis la " revigligan " eksterordinaran kunvenon (4-10-1997) same kiel D-ro Albault kaj lia fratino Odette, la Federacia sekretariino kaj lasta respondeculino.(Ilia fratino Raphaëlle, elektita kasistino en 1983, jam delonge foriris de la regiono).

Notinde estas ke dum la Federacio " dormetis ", tamen ĉiujare okazis en Tuluzo la Zamenhof-taga festo, perfekte organizita de la Tuluzaj Esperanto-Fervojistoj (TEF), kiuj kunvenigis ĝis sepdek samideanojn el la tuta federacia regiono kaj eĉ de pli for ! Kaj valora ŝtupo al la regiona federacia revigliĝo estis la fondo en 1993 de Esperanto Kultur-Centro, jam ia federacio, sur la loka kampo, de plejparto de la Tuluzaj esperantistoj.

Ne eblas paroli en ĉi-tiu artikolo, kiu estas nur ia " ĝenerala enkonduko ", pri ĉiu grupo aŭ departemento, sed viaj prilokaj artikoloj estos bonvenaj ! (sekvote).

Christian Lavarenne
(la novelektita federacia sekretario)

## BLINDULA E-SONGAZETO "POLA STELO"

Se ni volas eviti ĝian malaperon ni devas varbi novajn abonantojn.La prezo de la jarabono, ankoraŭ ne definitive fiksita, kostos prok. 28 dolarojn plus minimumajn sendokostojn. La abonantoj ricevos 4 fojojn jare el Varsovio, ĉiufoje po 2 kasedoj 90-minutaj, do entute 8 kasedojn 90-minutajn. La provizorajn antaŭmendojn akceptas: Pola Radio-Esperanto-Redakcio-Poŝtfako, 46-PL-00977 VARSOVIO.

(Ramon Perera)

## KOOPERATIVA STELO

Ni danke kvitancas la ricevitan revuon de la Internacia Kooperativa E-Organizo kaj tre volonte ni informas ke temas pri 16-paĝa revueto DIN-A-5 formata kun interesaj artikoloj nur pri kooperativismo. La nefakulojn altiras la lasta informpaĝo kiu klarigas laŭ statistiko 1996, ke en la mondo ekzistas pli ol 765 milionoj da kooperativistoj en 95 landoj kaj sur paĝo 5-a kaj 6-a la Deklaro pri la kooperativaj bazprincipoj. La unua punkto klarigas la difinon jene: Kooperativo estas aŭtonoma asociiĝo de personoj uniĝintaj propravole celante plenumi komunajn ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn bezonojn per komuna posedaĵo kaj demokratie direktita entrepreno.

Interesiĝantoj pri la temo povas sin turni al la redakcio laŭ jena adreso: Kooperativa Stelo-Bartók Béla út, 67-69-H-5600 BÉKÉSCSABA (Hungario)

## NOVA E-GEJO GRUPO

Antaŭ kelkaj monatoj fondiĝis Gejo E-Grupo nur por junuloj inter 18 kaj 35 jaroj. Unu el la celoj de la Grupo estas batali kontraŭ antaŭjuĝoj, interkonatigi samseksamajn geesperantistojn kaj informi pri E. inter gejoj.

Informoj riceveblaj ĉe : Esperanto Gejo-Grupo - p/a De Schepper P-Postbus,47-BE-2650 EDEGEM-1 (Belgio) - retpoŝto: gd32770@glo.be.

(P. Schepper)

## BET-34

La 34-aj Baltiaj E-Tagoj organizitaj de Litova E-Asocio okazos inter la 18-a kaj la 24-a de julio 1998, en urbeto Veisiejai en Suda Litovio, proksime al landlimo kun Pollando, urbeto kie loĝis D-ro Zamenhof. La aranĝo celas studi problemojn de la E-movado; elstarigi nuntempajn ĉefajn taskojn de la E-agado; interŝanĝi spertojn pri esperantista agado; perfektiĝi en E. kaj enhavoriĉe pasigi la tempon. (Detala informado kaj aliĝilo havebla ĉe nia Asocio).

(Litova E-Asocio)

## PROJEKTO KOTOPO

Al ni alvenis feliĉiga broŝuro pri projekto vere vigliga far kelkaj gemembroj de JEFO kaj CERL, kaj ties realiĝo povas esti granda sukceso por la E-junulara movado. Temas pri entreprena ideo, kiu kunigas tradician negocon, kiel estas trinkejo, kaj novecan lingvon, kiel estas Esperanto. Por krei kaj funkciigi tiun lokon, asocio estis kreita: " Mille et une langues " (Mil kaj unu lingvoj). La nomo de tiu loko, cetere, tute trafe elpensita,estos KoToPo.

En la informa broŝuro de la pola asocio oni detalas ĉion, skize sed klare, pere de la ki-vortoj. Do resume: Kio? mult-kultura ejo, informejo pri Esperanto, trinkejo internaciema; Kie? en popola kaj turista, malnova sed novema kvartalo " la Croix-Rousse ", unu el la plej centraj en la urbo Liono; Kiu? Komitato de junaj geesperantistoj, jam spertaj pri organizado de aranĝoj kaj funkciado de asocioj; Kial? Ĉar "guto post guto la akvo traboras eĉ la ŝtonon granitan"; Kiel? per kun-temaj vesperoj, ekspozicioj, koncertoj, ĉeesto kaj deĵorado de esperantistoj, informbretoj, libro kaj gazet-konsultejo kaj karto, muziko kaj etoso internaciemaj; Kiam? plejeble la 22an de januaro 1998; Kiom? nur kelkaj miloj da francaj frankoj mankas ankoraŭ sed ĉiuj povas helpi per pruntedono de mono, subtenanta membreco (120 FRF jare) aŭ aliĝo al la " Rondo de la Fondintoj" (minimume 5000 FRF). Tiuj du lastaj eblecoj, kompreneble, signifas apartenon al " Mille et une langues ".

Ŝajne do, venontjare, la trinkejo KoToPo estos realo kaj ne plu projekto. Ĉiukaze, nur danke al tiaj projektoj, belaj, lertaj kaj kuraĝaj, la mondo (kaj la tutmonda lingvo) antaŭeniras.

Elkore ni deziras al geamikoj de " Mille et une langues " plej grandan sukceson. Tostos ni baldaŭ, ĉu ?.

(El Kata/Luno 34/35 novembro 1997)

## NOVELKONKURSO POR VIRINOJ

Organizita de Forum Femmes Méditerranée el Francio,Tunizio, Israelo, Palestino kaj Italio laŭ la temo : " Destinoj de virino " celas virinojn el ĉirkaŭ la Mediteranea maro, kiuj neniam ion eldonis. Novelojn 5-10 paĝaj verkita de unu virino aŭ grupo de virinoj oni akceptas en kiu ajn lingvo.Sendu 3 ekzemplerojn ĝis la 30-a de novembro 1998 al:

Forum Femmes Méditerrannée
24 rue Montgrand
FR-13006 MARSEILLE

(Renée Triolle -UEA)

## SOMERA E-KURSEJO EN RUSIO

Okazos inter 19-26 de julio 1998 en E-Centro Jekaterinburg en Ruslando je tri niveloj: elementa, daŭriga kaj supera kursoj. Pliaj informoj ĉe retpoŝto: hrgo@sbank.e.burg.su

(Interredaktore)

## BELARTAJ KONKURSOJ LIRO-98

Urala E-Societo invitas ĉiulandajn esperantistojn partopreni ilin. La temoj estos: originala prozo,originala poezio,eseo kaj primovada karikaturo, ĝis la 1-a de julio 1998.
(Pliaj informoj haveblaj ĉe nia Asocio)

(Interredaktore)

## 33-a INTERNACIA E-FERIADO

Okazonta en Karpacz Sud-Okcidenta Pollando inter la 10-a kaj 24-a de aŭgusto 98. (Petu pliajn informojn ĉe nia socio, tamen vi povas ankaŭ vidi ĝian web-paĝon:
http.// www.frumious.demon.co.uk/feriado.html

(Eric Walker)

## HELMAR FRANK DISTINGITA

Prof.d-ro Helmar Frank, prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) ricevis je la 17-a de marto 1998 la meritkrucon unuaklasan de la Merita Ordeno el Germanio. Per tiu alta distingo la prezidento de Germanio honoras la sciencajn kaj homajn meritojn kiujn Frank akiris, ankaŭ pri la fondo de kaj en la laboro por AIS.

(Interredaktore)

(Nia Asocio kiu kunlaboris kun li en la 3-a Internacia Konferenco de TAKIS, okazinta en Taragono en 1987, tutkore gratulas lin).

## FAME-KULTURPREMIO

FAME-Fondaĵo transdonos la 6an E-Kulturpremion al d-rino Marjorie Boulton, dimanĉon la 26an de aprilo 1998 en la urba biblioteko de Aalen (Germanio). La omaĝan paroladon prezentos la islanda poeto Baldur Ragnarsson.

(Interredaktore)


## BIBLIOTEKO SAVOTA

FAME-Fondaĵo ĵus decidis per 3.000 germanaj markoj kontribui al savado de eminenta kolekto de E-materialo de la biblioteko de fondaĵo Vanbiervliet en la belga urbo Kortrijk.

(Interredaktore)

## HEROLDO INFORMAS

La primtempa duobla numero de Heroldo de Esperanto enhavas la plej detalan liston de renkontoj, kunvenoj, internaciaj kursoj, seminarioj, konferencoj, forumoj kaj kongresoj, kiuj okazas en la E-mondo. En la listo por 1998 detale aperas datoj, adresoj kaj programoj de preskaŭ 250 iniciatoj. Kiu deziras esti bone informita, tiu petu la menciitan duoblan numeron, senpage, de la redakcio. Heroldo de Esperanto-CP,237-CH-6830 CHIASSO 1 (Svislando).



INSTRUADO/LINGVO

★ Privilegia Vojo al lingvoscio. V.Setälä. 128p. 18 cm. Rektmetoda kurso, kiu instruas novajn vortojn per simboloj, desegnaĵoj aŭ jam lernitaj vortoj. 700 p-toj.

★ Marĝene de la lernolibro. B.Golden. 58 p. 20 cm. Kolekto de studaĵoj kun la celo instrui ĝustan lingvouzon. 525 p-toj.

★ Materialoj pri la nuna uzado de la Akuzativo. D.Moirand. 331 p. 20 cm. 3.000 p-toj.

★ Vortkonsisto-Vortfarado-Vortanalizo-Vortordo. A.Cherpillod. 55 p. 21 cm. 1.400 p-toj.

★PO La diabla vorto. A.Cherpillod. 20 p. 21 cm. 700 p-toj.

★ Esperanto-Curso del idioma internacional. M.Gutiérrez (con clave ejercicios). 2.000 p-toj.

★ Curs complet de la llengua int. Esperanto. J.Grau Casas. 169 p. 20´5 cm. 1.000 p-toj.

VORTAROJ

★ Plena Ilustrita Vortaro kun suplemento. SAT. 1303 p. 20´5 cm. La ĝisnuna plej kompleta vortaro en E. kun 30 kompletaj ilustritaj paĝoj. 10.000 p-toj.

★ Plena Vortaro kun suplemento. SAT 511 + 63 p. 17´5 cm. 3.400 p-toj.

★ Originala E-Bildvortaro. S.Chaves. 170 p. 21 cm. Laŭtema ilustrita vortaro. 1.700 p-toj.

★ Nepivaj Vortoj (dua eldono). A.Cherpillod. 182 p. 21 cm. 3.000 p-toj.

★ Knedu min sinjorino. R.Corsetti. 23 p. 29´5 cm. Tabuaj kaj insultaj vortoj en E. 500 p-toj.

★ Vocabulario E-Español. Tudela. 171 p. 21´5 cm. 1.200 p-toj.

★ Lexicon Sopena. E-español kaj inverse. 13´5 cm. 900 p-toj.

DIVERSAJ

★ Pasporta Servo 1998. 871 adresoj en 75 landoj. 15´2 cm. 163 p. 1.800 p-toj.

★ Zamenhof, autor de l´Esperanto. M.Boulton, (trad.J.Carbonell). 237 p. 21´5 cm. Katalunligva versio de la plej bona biografio de Zamenhof ĝis nun, kun historia resumo pri la kataluna movado de N.Fluvià. 1.200 p-toj.

★ Monumente pri Esperanto. H.Röllinger. 111 p. 23´5 cm. 1.400 p-toj.

★ Struktura kaj Socilingvistika Esploro de Esperanto. I.Koutny/M.Kovács. 161 p. 21 cm. 1.600 p-toj.

★ La Metamorfozo. F.Kafka (trad.M.Nervi). 75 p. 21´5 cm. 2.000 p-toj.

★ Aminda. L.Cdeij. 104 p. 21 cm. 1.700 p-toj.

★ Ili kaptis Elzan. J.Valano. 104 p. 21´5 cm. 1.500 p-toj.

★ La Sentimulo. J.F.Cooper/R.Imbert. 72 p. 20 cm. 1.000 p-toj.

★ Dankon, Amiko !. C.Piron. 40 p. 20 cm. 700 p-toj.

